

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2002



*Impresoj el someraj Valamo-kursoj. (Fotoj: Pasi Solonen; artikoloj p. 4-6.)*

**Aŭtunaj Tagoj, p. 10 ♦ Vojaĝo de Asorti, p. 7**

**Novaj serioj: Sur la nokta ĉielo, p. 18 ♦ Trakalendare, p. 21**



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo:** ✉ [esperantolehti@esperanto.fi](mailto:esperantolehti@esperanto.fi)

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritämäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritämäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ [ilkka.santtila@esperanto.fi](mailto:ilkka.santtila@esperanto.fi)

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 13,50 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritämäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ [anna.ritamaki@kolumbus.fi](mailto:anna.ritamaki@kolumbus.fi)

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ [paivi.saarinen@iki.fi](mailto:paivi.saarinen@iki.fi)

**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**

*Anna-Liisa Heikkinen*, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ [annaliisa.heikkinen@surfeu.fi](mailto:annaliisa.heikkinen@surfeu.fi)

*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ [jukka.noponen@iki.fi](mailto:jukka.noponen@iki.fi)

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**

*Irja Miettinen*, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 ✉ [irja.miettinen@WWnet.fi](mailto:irja.miettinen@WWnet.fi)

*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ [raitapy@jymy.kase.fi](mailto:raitapy@jymy.kase.fi)

*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ [eafkasisto@esperanto.fi](mailto:eafkasisto@esperanto.fi)

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Officejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>

## Ŝvite ĉe taskoj

Karaj EAF-anoj kaj legantoj!

Via prezidantino ŝvitas antaŭ ekrano. Jam denove estas tempo verki ion, malfermi novan numeron – denove sen la sopirata, nova ĉefredaktoro.

Denove mi sentas min respondeca (ja mi sentas ke mia tempo ne sufiĉas por ĉio farinda), sed mi admonas al mi mem por ke mi ne tro zorgu: kiel prezidanto vi estas formale respondeca, sed ne pensu ke vi povas engaĝiĝi pri ĉio, tio ne estas necesa.

Kaj, ja estas vero, ke mi kiel anstataŭanta ĉefredaktoro nur malmulton vere devas fari. Preskaŭ ĉio funkcias bonege, el mia vidpunkto preskaŭ de si mem. Artikoloj alfluadas. En iu momento Ilkka sendas al ni en la redakta grupo liston de alvenintaj artikoloj. Ni povas reagi kaj atentigi pri eventuale mankantaj eroj. Ilkka enpaĝigas kaj en Jyväskylä Pentti prizorgas la presadon kaj ekspedadon al la adresoj liveritaj de Tapio, kiu en Helsinko prizorgas nian membreregistron.

Principe mi kiel ĉefredaktoro devus decidi multajn aferojn, aŭ almenaŭ atentigi la aliajn pri diversaj decidindaĵoj, ekz. pri tempa prioritatigo de artikoloj, kion enmeti nun, kion poste, ĉu produkti 24-paĝan, 30-paĝan aŭ 34-paĝan aŭ ĉu eĉ pli dikan gazeton? Ofte la finan decidon devas fari Ilkka tute sole. Dank' al lia ordiga laboro la materialo iĝas gazeto.

Mi ankaŭ havas ĝojan novaĵon: Esperantolehti ricevis subvencion de la edukministrejo por la dua sinsekva jaro, ĉi-jare 1000 eŭrojn. Sed jam sekvafraze venu de mi konfeso: mi fakte ne scias kiom unu numero de

la gazeto kostas. (Mi scias, tion mi povus facile ekscii per simpla peto al la kasisto aŭ mi povus kontroli la aferon per simpla rigardo en la jarkunvenaj paperoj, sed mi nun ne faris tion. Ĉu iu alia faros tian analizon por la sekva gazeto aŭ ĉu mi mem faru?) Cetere estus interese kompari la poŝtajn tarifojn depende la paĝonombro.

Mi kontentus se mi scius la financajn sekvojn, la diferencon en preskostoj kaj en sendokostoj depende de diversaj miligramaj pezoj.

Ofte ni povus tre simple plibonigi nian agadon, lerni pli pri ĝi, sed ofte ni ne prenas la tempon por esplori pri la bazaj aferoj. Ofte ni forgesas fari la bazan demandon: kiel ni povus, realisme, sukcesi pli bone, eble fari pli facile – kaj samtempe pli efike?

Pri Esperantolehti la redaktogrupo sistemo montriĝis bona. Speciale atentinda estas ke FEJO bone atentis la limdatojn kaj por ĉiu numero sendas interesan materialon. Ĉu ni ankaŭ havos novan ĉefredaktoron – aŭ ĉu ni trovos alian plibonigan sistemon?

La estraro en sia kunsido en julio decidis pluevoluigi planojn por prezenti financon subtenon por informada projekto, verŝajne ĉefe por ekstera informado. Viaj ideoj estas bonvenaj.

Verkante tion ĉi mi estas survoje al la Universala Kongreso en Brazilo. Tie mi verŝajne eĉ pli ŝvitos ol nun verkante, pro komitat-kunsidaj traktendaĵoj, sed ankaŭ, pro la varma vetero ĉe marbordo.

Sunajn salutojn de via

*Anna Margareta*

## Sukcesaj Valamo-kursoj 2002

Ĉi-jare en Valamo okazis tri kursoj: 1.-5.7.2002 elementa kaj daŭriga kursoj kaj 5.-7.7.2002 seminario por esperanto-instruistoj. La elementan kurson partoprenis 6 gelernantoj kaj ilin instruis Sylvia Hämäläinen. La kursolibro estis *Egaleco kaj paco per Esperanto* de Lars Forsman, tradukita finne de Raita Pyhälä. La partoprennombro de daŭriga kurso estis 8, kiujn Atilio Orellana Rojas instruis per sugestopedia metodo. En la semajnfina seminario partoprenis 5 instruistoj sub gvidado kaj instruado de Atilio.

La kursanoj mem rakontas pri sia spertoj: Pasi Solonen pri la elementa kurso, Auli Vihermä pri la daŭriga kaj Raita Pyhälä pri la seminario. Legu

mem! Nome de EAF mi volas danki al la instruistoj kaj al ĉiuj partoprenantoj kaj vizitantoj de la Valamo-semajno. Ankaŭ koran dankon al la personaro en Valamo. Specialan dankon al Pietari Virtanen pri la lerta ĉiĉeronado de Valamo monaĥeja areo kaj al Jukka Laaksonen, kiu gvidis nin dum ekskursoj al la monaĥeja tombejo kaj al la kruco de la migranto. Venontjare la kursoj okazos 14.-18.7.2003 (lunde-vendrede) por ebligi flekseblan daŭrigon al la IJK kaj UK en Svedio. Pliaj informoj en venontaj numeroj de Esperantolehti.

*Tiina Oittinen,  
kursospondeculo de EAF*

---

### La unuan, sed verŝajne ne la lastan fojon en Valamo

Jes, kaj neniu venu al mi komplate dirante, ke jen ree avinjo, kies kapon konfuzis iu eksterlanda, juna ĉarmulo! Nu, kio do! Ne estas kulpo de la avinjo.

Fakte, mi intencis tute senŝerce priskribi la ĉi-someran Esperanto-Simpozion en Valamo, kaj precipe miajn proprajn spertojn dum ĝi.

Ne realiĝis la konversacia grupo, pro kio ni havis nur du kursojn, la elementan kaj la daŭrigan. Tiun gvidis Atilio Orellana Rojas. Atilio uzis sugestopedan metodon, kiun li studis en Francio. Mi jam iomete estis legin-

ta kaj interesiĝinta pri tiu metodo kaj ankaŭ sciis pri kelkaj eksperimentoj en la proksimaj lernejoj. – Sed nun mi mem estos parto de la metodo, ludonte rolon en la spektaklo.

Unue ni ricevis novajn personecojn. Post tio en nia tre internacia rondo troviĝis i.a. eĉ germana dukino, mondfama operkantisto kaj ĥirurgo el Ukrainio. Kaj ni obeeme ŝanĝiĝis, kvankam ni unue estis iom konfuzitaj. Baldaŭ oni ne povis memori, kiu esti, ĉu Anjo el Oulunsalo, aŭ Ĉarlota el Ĉikago, sed de tago al tago, iom post iom, ni kutimiĝis.

Nia memorkapablo estis ankaŭ forte el-

## Esperanton alkeiskurssi Valamon kansanopistossa 1.-5.7.2002

Saavuimme luonnonläheiseen ja rauhalliseen Valamoon Heinävedelle Sunnuntai-iltana 30.6.2002. Tiedon esperanton alkeiskurssista saimme Valamon luostarin kotisivuilta 26.6, joten ilmoittautumisaika kurssille oli jo mennyt umpeen. Ilmoittautuminen ja tiedustelut kurssista kävivät kätevästi sähköpostilla johon ystävällisesti vastasi Pirkko Laurio kansanopistosta. Pidimme aikaa ja paikkaa sopivana (kesäloma), joten ilmoittauduimme kurssille ”sokkona” ja avoimin mielin, ilman mitään aikaisempaa käsitystä esperanton kielestä. Myös kurssin hinta oli mielestämme sopiva ja majoitus sekä ruokapuoli osoittautuivat hyvinkin rahan arvoisiksi, kuten myös itse kurssi-ohjelma.

Alkeisryhmään meitä tuli kuusi opiskelijaa ja opiskelu opettajamme Sylvi Hämäläisen johdolla sujui mukavassa hengessä. Opetus oli monipuolista, oli kevyttä liikun-

taa, leikkejä, pelejä, laulua, puhumista ja kirjoittamista. Kurssiohjelmaan oli sisällytetty myös retkiä; laivaristeily Taivallahden kanavalle, luontoretki rukousmetsäpolulle ja luostarin hautausmaalle, jossa sijaitsee mm. Pentti Saarikosken hauta, vaellus matkamiehen ristille n. 2,5 km kauniina ja lämpimänä kesäpäivänä, joka oli todella kaunis ja rauhallinen paikka, saunailta Kämppe Rissillä, jossa oli mahdollisuus käydä uimassa. Oli myös yhteisiä illanviettoja ja slaavilainen juhlaillallinen.

Järjestelyt kurssin aikana toimivat jokseenkin hyvin ja kurssista jäi hyvin positiivinen mieli kaikin osin.

Esperanton kieli alkoi myös kiinnostaa helposti opittavana loogisuutensa ja selkeytensä vuoksi. Lisäksi esperantistit ovat oikein mukavia ja kansainvälisiä ihmisiä.

*Hyvää kesänjatkoa kaikille!  
Pasi Solonen / Kati Kurki*

provata. Ankoraŭ hodiaŭ mi memoras la vorton, kiun mi promesis plene forgesi, ankaŭ kelkajn vortojn de la kunforgesantoj. – Iu stranga, nekomprenebla laŭmetoda rimedo por plibonigi al si la memoron.

Preskaŭ tutan tempon aŭdiĝis mallaŭte bela, klasika, baroka muziko, kiu onidire estas la plej efika por la lernado. La lernantoj iam kredas, ke ili tute ne fariĝis instruitaj, sed tamen multo restas en ilia memoro. Mi kredas pri tio. Neniam antaŭe mi studis tiel senĝene, neniam la lecionoj estis tiel amuzaj, neniam antaŭe mi vidis mezaĝajn lernantojn kanti, ludi kaj danci tiel libere kaj libervole.

Certe estis pli facile sin esprimi esperantlingve, ĉar mi ja ne estis mi, emerita instruistino, sed riĉa usona sinjorino, kies plej grava tasko ŝajnis esti varti kelkajn danhundojn.

Atilio kreis komfortan, trankvilan atmosferon krom per muziko, ankaŭ per floroj, bildoj kaj krepuska lumo en la klasĉambro. La atmosferon mi efektive sentis blua, kvankam tion esprimante, malkaŝante, mi sentis min iel snoba. Eble mi estis sorĉita.

Ke ni estis sufiĉe indaj lernantoj, mi esperas pro tio, ke Atilio vere senhalte kaj senripoze laboris, kaj tutan tempon donis al ni multon de si mem. ▷

## Semajnfina seminario de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj

Fine de la kursosemajno en Valamo okazis 5.-7.7. seminario por tiuj, kiuj ŝatus lerni instrui Esperanton plej eble efike. Gvidate de Atilio Orellana Rojas la seminarion partoprenis 5 lernemaj instruantoj. Evidentiĝis, ke efikeco ne ekskluzivas amuzaĵojn, ludojn, muzikon, ridon. Efika instruado postulas grandan laboron de la instruisto, sed la lernantoj lernu kvazaŭ senpene kaj almenaŭ sen riproĉoj, timo kaj tediĝo. La instruisto zorgeme forigu el sia animo malesperon kaj malfidon kaj el sia vortostoko ĉiujn mal-kuraĝigajn vortojn. Ne tiom gravas, kiun lernolibron li/ŝi uzas aŭ ĉu li/ŝi instruas sen lernolibro. Ŝia/lia plej valora allogaĵo estas pozitiva aktitudo. Ŝi/li sciu, ke la cerbo ne povas atenti pri ĉio. Malinteresaj kaj enuigaj lecionoj forgesiĝos, kaj nur gajaj, bonetosaj lecionoj restos en la memoro. Tial ŝia/lia plej alta ambicio estu ne tedi. Tio postulas de ŝi/li grandan atentemon, paciencon, vastajn konojn pri la lingvo kaj pri la homaj psiko kaj konduto. Li sciu, ke homoj lernas ne nur per okuloj (legado, bildoj) sed ankaŭ per oreloj, manoj, piedoj, nazo, tuŝo kaj flar-

sento. La klasĉambro estu bela kaj agrabla, kun komfortaj seĝoj kaj belaj afiŝoj kaj floroj. Oni ne malsata venu en ĝin (A.O.R. tre rekomendis i.a.pomojn). Memklare estas, ke la kondiĉoj ege malsamas en lernogrupoj kaj ĝuste tial la instruisto devas esti kiel eble plej inventema kaj adaptiĝema. Oni povas misuzi eĉ la plej modernajn ilojn kaj, kontraŭe, glori sukcesojn eĉ en primitivaj cirkonstancoj. Multo dependas de la instruanto.

La seminarianoj rapide trarigardis skizitan historion pri la metodiko de lingvoinstruado kaj konatiĝis kun diversaj principoj de famaj pedagogoj, kiaj Freinet, Steiner, Cseh, Lozanov. Ili ankaŭ spektis modernajn vidbendigitajn lecionojn kaj provis mem instrui gramatikerojn (al, kun, per, kial, ĉar, adverba finaĵo -e) per rekta metodo, t.e. nur en Esperanto kaj sen gramatikaj reguloj kaj terminoj. Dum la seminario ĉiuj rajtis diskuti, demandadi kaj prezenti siajn opiniojn kaj spertojn. Ankaŭ dum niaj lingvokursetoj ĉiu sentu sin grava kaj akceptata. Por ne fariĝi tede seriozaj, la seminarianoj sabatvespere ekskursis al Joensuu.

---

Kaj ni ne forgesu la bambon...

*Por partopreni la kurson,  
Por partopreni la kurson  
Necesas jeno: iomete da volo,  
Iomete da volo, kune kun energio,  
Al la supro, la supro,  
Al la supro, la supro,  
Alvenos mi,  
Kaj fariĝos spertulo,*

*Kaj fariĝos spertulo,*

*Se volas mi,*

*Se volas mi,*

*Se volas mi.*

– Anjo (Ĉarlota Lorenz)

PS. Mi evitis troan dikiĝon malgraŭ la abunda manĝo sekvante konsilon de mia ortodoksa amikino: – Batalu! (Kilvoittele)

## Vojaĝo de Asorti

La litova ensemblo ASORTI, Elena & Edvard, venis al Ali-Seppälä ĉe Börje Eriksson 22.6. La 23.6 estis mezsomera festo en Tapola, hejmo por mense handikapitaj kun danckoncerto de Asorti, 24.6 ili partoprenis koruskoncerton en Orimattila. La sekvan tagon Edvard filmis esperartaĵojn kaj vespere ili iris naĝi, remboati. Sekve okazis tago en Lahti. Ĵaŭde 27.6. estis ĝardenfesto kun koncerto en Ali-Seppälä. Ili foriris de Ali-Seppälä vendrede matene por Iisalmi kaj tie partoprenis kaj ludis dum Maakuntapäivät semajnfine. Ili gastis ĉe Onni Kauppinen.

Lunde la 1.7. ili forveturis al Taivalkoski kie ili koncertis en Päätaalo-instituto la 3.7 kaj la 4.7. kun milo da aŭskultantoj dum la ĉi-jara Päätaalo-semajno (1-7 julio). Ili kontribuis ankaŭ al aliaj programoj de la festivalo, nomita laŭ la verkisto Kalle Päätaalo, kaj ludis kaj kantis en la vilaĝo Metsäkylä. En Arbaro de Zamenhof ASORTI elektis

### Asorti katusoittokisoissa

Olin ilmoittanut Elenan ja Edvardin katusoiton SM-kilpailuun Pieksämäelle kysymättä edes heidän mielipidettään asiasta. Oli keskiviikko ja 10. heinäkuuta kun lähdimme Vesannolta kohti Pieksämäkeä. Katusoiton SM-kilpailuun oli ilmoittautunut kuusi ryhmää, neljä kotimaista ja kaksi ulkomailta. Kilpailijoiden tehtävänä oli soittaa ennalta määrätyissä kohteissa kaupungilla. Eli käteen annettiin kartta, johon kohteet oli merkitty ja jonka mukaan piti yrittää suunnistaa esim. pankkien, markettien oven pieleen soittamaan. Yhdessä kohteessa soittajat olivat varsin verran kerrallaan ja kokonaisuudessaan katusoiton kesti klo 14.00-17.00. Tuomarit kiersivät tuona aikana kuuntelemassa kaikkia osanottajia. Loppurutistus alkoi torin esiinty-

arbron, kiu ekhavis la nomon Litovio. Dum la Päätaalo-semajno kunsidis ankaŭ trideko da verkistoj el sep Baltmaraj landoj en seminarioj, kunorganizitaj de Päätaalo-instituto, kies direktoro Osmo Buller utiligis la okazon ankaŭ por informi ilin pri Esperanto kaj ĝia literaturo.

Post Taivalkoski ili revenis suden al Vesanto kaj al Pieksämäki, kie ili gajnis premion en stratluda konkurso (legu la finlingvan raporton de Kimmo Hakala). Post Vesanto ili denove mallonge vizitis Iisalmi kaj de tie veturis al Kimito por viziti Källkullen ĉe Anna Ritämäki kaj Carola Antskog. La lastajn tagojn ili restis en Helsinki kaj tranoktis en la oficejo. Hejmen ili vojaĝis la 17-an de julio tra Estonio.

*La tekston kompilis Tiina Oittinen  
kun helpo de la gastigantoj*



mislavalla klo 18.00. Siellä kaikki kilpailijat esiintyivät vuorollaan, niin myös Elena ja hannuri sekä Edvard kitaransa kera. Yhdessä he soittivat ja lauloivat, esperantoksi tietysti ja pehmittivät tuomaritkin. Eli Asorti voitti katusoiton SM-tittelin Liettuaan: Palkintoon kuului ruskea kirjekuori, joka sisälsi 170 euroa (palkintosummaksi ilmoitettu 17.000 senttiä!), upea kunniakirja sekä pieniä paketteja. Lisäksi kilpailun järjestäjät, Savon Sanomat ja Stora Enso Metsä tarjosivat voittajille munkkikahvit Pieksämäen torin kahvipisteessä. Mukava oli olla mukana sivustaseuraajana ja esperantokin tuli hyvin esille.

*Kimmo Hakala, Vesanto*

## Asorti esperantigis la Päätalo-semajnon

Ekde 1979 okazas en Taivalkoski ĉiusomera festivalo nomita laŭ Kalle Päätalo, la plej fama filo de la komunumo. Ĝi altiras du-tri mil ŝatantojn de la verkoj de Päätalo. Ili aŭdas prelegojn, vizitas lokojn konatajn el la romanoj, spektas teatraĵojn, ĝuas koncertojn kaj revidas malnovajn konatojn.

Esperanto "penetris" la semajnon unuafoje en 2000 per prelego de Osmo Buller pri la minacata pozicio de malgrandaj lingvoj en seminario okaze de la 10-jariĝo de Kallioniemi-fondaĵo, kiu financas la Päätalo-instituton kaj portas la nomon de la infanaĝa hejmo de la verkisto. Samjare la esperantistoj de Metsäkylä sub la gvido de Aini Vääräniemi vendis produktojn de sia vilaĝo en la "Placa Evento", kiu tradicie okazas sabate antaŭtagmeze. Oni povis denove renkonti ilian budon en 2001. Cetere, jam de longe ili havas etan ekspozicion en la montrofenestro de la turisma informoficejo apud la centra placo de Taivalkoski.

Ĉi-jare Esperanto multe pli videblis kaj aŭdeblis ol antaŭe dank' al la litova ensemble ASORTI, kiu koncertis dum unu horo en la Placa Evento la 6-an de julio. Almenaŭ 600 homoj aŭdis kantojn en Esperanto kaj aliaj lingvoj. Fine de la prezentado Osmo Buller intervjuis Elena Piscikos tradukante ŝiajn respondojn por la finna publiko.

Jam la antaŭan tagon ASORTI kantis en Jokijärvi, la naskiĝvilaĝo de la verkisto, antaŭ 200-homa publiko en la kunveno de la Societo Kalle Päätalo. Malpli grandan sed des pli entuziasman aŭskultantaron ASORTI renkontis en la vilaĝo Metsäkylä. Tie ili prezentis rusajn, litovajn kaj Esperantajn

kantojn dufoje: en la Arbaro de Zamenhof – kie ili ankaŭ sekvis la tradicion kaj dediĉis arbon al sia lando Litovio – kaj en la trinkejo Arbar-Bar. La publiko kunkantis kelkajn kantojn el Esperanta kantlibro kaj la aranĝoj fariĝis bona reklamo por Esperanto.

Kvankam la tritaga vizito de ASORTI al Taivalkoski estis laborplena – krom koncerti, ili filmadis por vidbendo pri la finna movado – restis ankaŭ tempo por turismumi kaj konatiĝi kun la finna saŭno. Nova sperto por ili estis ekzemple la sceno, kiam dum saŭnumado Edgar kun Sulo Kajjala (la mastro de la vilaĝa vendejo kaj Arbar-Bar) venis eksteren por refreŝiĝi. La du saŭnumantoj sidis nudaj ekstere kaj preterpasantoj gaje salutis ilin sen esti mirigitaj aŭ ŝokitaj, kvaŭ du nudaj viroj trinkantaj bieron apud la vojrandoj estus plej normala afero.

Esperanto aperis ankaŭ en alia maniero dum la semajno, nome en kvizo, en kiu konkursis deko da bonaj konantoj de la verkoj de Päätalo. Por konigi la sistemon de la kvizo al la konkursantoj la kvizestro, inĝeniero Jouko Knuutinen faris jenan provdemonstracion: "En kiu romano de Päätalo, kaj kiel, aperas Esperanto?" Jen la respondo: temas pri "Nuoruuden savotat" ("Junaĝaj arbohakejoj"), en kiu Päätalo mencias pri la Esperanto-lernado de sia frue mortinta amiko Kalle Hoikkala. Je granda surprizo la kvizestro tiam montris al la 200-kapa publiko la lernolibrojn, kiujn Kalle Hoikkala uzis en la 30-aj jaroj kaj kiuj bone konserviĝis ĝis nun.

*Osmo Buller*



## Euroscola-matkapäiväkirjasta

Viime numerossa Pauliina Niinikorpi kertoi Euroscola-matkamme alusta. Tässä seuraa ote Kristiina Ali-Simolan matkapäiväkirjasta. Pyrimme saamaan aikaan vastaavan matkan keväällä 2004. Asiasta kiinnostuneiden 15-17 v. kannattaa nyt jo ruveta oppimaan esperantoa. Lisää tietoa antavat mukana olleet nuoret ja ELFIN puheenjohtaja.

### Strasbourg maanantai 18.3.2002

Aamupalan jälkeen lähdimme keskustaan shoppailemaan. Siinä kuluikin koko päivä. Ostin itselleni ihanan sinisen hörhelöpuseron ja farkkuhameen. Päivä oli upea! Illalla kokoonnuimme kaikki yhteen harjoitteluun kongressia varten.

### Strasbourg tiistai 19.3.2002

Heräsimme varhain ja aamiaisen jälkeen lähdimme kohti Euroopan Parlamenttitaloa. Perillä ihastelimme tuota upeaa rakennusta ennen kuin menimme sisälle. Siellä jouduimme turvatarkastukseen.

Sitten kongressi alkoikin. Puhuttiin maailmanlaajuisista asioista. Kongressiin osallistuneita nuoria (n. 150 henkeä, joista esperantisteja 35) esiteltiin jokaisesta maasta. Kysymykseen esperantosta mahdollisena EU:n työkielenä vastattiin, että EU:lla on tällä hetkellä käsiteltävänä tärkeitä asioita.

Kaiken kaikkiaan kongressi oli hieno kokemus. Kongressin jälkeen lähdimme keskustaan shoppailemaan ja syömään. Illalla palasimme hotelliin. Oli ollut todella upea ja ikimuistoinen päivä!

### Strasbourg keskiviikko 20.3.2002

Aamulla lähdimme junalla Pariisiin. Siellä oli joitakin järjestelyvaikeuksia ennen kuin pääsimme syömään ja sen jälkeen viime hetken shoppailulle. Ostin äidille pienois-Eiffel-tornin ja tädille Pariisi-lusikan. Ilta-koneella lähdimme Suomea kohti, kotona olin puolen yön jälkeen.

Kokonaisuudessaan minulla oli aivan uskomattoman ihana matka ja olisin valmis milloin tahansa lähtemään uudelleen. Olen päättänytkin, että vielä palaan Pariisiin. Sitä ennen pitää jatkaa esperanton opiskelua ja aloittaa ranskan kieli!

*Kristiina Ali-Simola*

## Nova PIV

*Nova Plena Ilustrita Vortaro* jam estas akirebla de la libroservo de UEA.

La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed en korpigitaĵoj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT.

La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ EUR 78,00 plus la kutimaj aldonaĵoj – 10% sendokostoj; 6% imposto (nur por EU-landoj). Per mendoj de 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) la LS donas sesonan rabaton (16,66%).

Foto de la nova PIV farita de Joost Witteveen estas videbla ĉe <http://www.uea.org/bildoj/pub/piv.jpg>.

*Gazetaraj komunikoj de UEA n-ro 151*

# Aŭtunaj Tagoj de EAF en Taivalkoski 21.-22.9.2002

## Suomen esperantoliiton syyspäivät Taivalkoskella 21.-22.9.2002

“Pensu globe – agu loke!” ♦ ”Ajattele globaalisti – toimi paikallisesti!”

En la pasinta numero aperis en Esperanto tiuj informoj kiuj nun aperas finnlingve.

### Tervetuloa Taivalkoskelle!

EAF:n syyspäivät (21.-22.9.2002) pidetään paikkakunnalla, jonka vain harvat tuntisivat ilman kirjailija Kalle Päätaloa (1919-2000), joka on syntynyt siellä ja kuvaa sitä romaaneissaan. Kyse on Taivalkoskesta, n. 5000 asukkaan kunnasta Pohjois-Suomessa. Oulu-Kuusamo -maantietä kuljettaessa se on 154 km Oulusta itään ja 64 km Kuusamosta länteen.

Suomalaisille esperantisteille Taivalkoskea on tehnyt toiminnallaan tunnetuksi Aini Vääräniemi, joka vetää esperantoryhmää kotikylällään Metsäkylässä. Siellä on hänen aloitteestaan jopa Zamenhof-metsä, *Arbaro de Zamenhof*, jonne monista maista tulleet kävijät ovat antaneet maansa nimen valitsemilleen puille. Hänen aloitteestaan Päätalo-instituutin satukilpailun kielenä on vuodesta 2000 ollut myös esperanto. Esperantokilpailua suojelee Esperanton maailmanliitto, UEA. Näistä ansioista Suomen Esperantoliitto palkitsi Ainin viime talvipäivillä kunniapalkinnolla *Aganto de la Jaro 2001*.

Esperantoa on Taivalkoskella harrastettu jo aiemminkin. Esperanta Finnlandossa 1920 olleen kartan mukaan lehdellä oli siellä tuolloin yksi tilaaja, jonka nimeä ei kuitenkaan ole ainakaan toistaiseksi saatu selville.

Lisää tietoa Taivalkoskesta on kunnan verkkosivuilla [www.taivalkoski.fi](http://www.taivalkoski.fi). Sieltä pääsee Päätalo-instituutin sivuille, joilla on kuvaus Kalle Päätalosta myös esperantoksi sekä satukilpailussa palkittuja satuja.

### Sabato 21.9.2002 Lauantai

La busa transporto de EAF startas 8.00 de la aŭtobusa stacidomo Oulu (aŭtobusa kompanio Ylisirniö). Mezvoje ĝi faros duonhoran halton por ebligi al la vojaĝantoj aĉeti matenmanĝon.

EAF:n tilaama linja-auto (liikennöitsijä Ylisirniö) lähtee Oulun linja-autoasemalta klo 8.00. Matkan puolivälissä on puolen tunnin mittainen pysähdys Niemitalon Juustolassa, missä voi nauttia aamupalan.

10.00-11.30 **Kolektiĝo** de la partoprenantoj en Hotelo Taivalvaara ♦ ricevado de dokumentoj, kontrolado de pagoj k.a. ♦ enloĝiĝo por tiuj, kiuj mendis tranoktadon ĉi tie. **Kokoontuminen** Hotelli Taivalvaarassa ♦ syyspäiväasiakirjojen jako, maksujen selvitys ym. ♦ hotelliin majoittuville huoneiden vastaanotto.

11.30-12.15 **Busveturo** al la feriejo Saija ♦ survoje halto ĉe la monumento de la militfervojo. **Bussikuljetus** Saijan lomakeskukseen ♦ matkalla pysähdys kenttäradan muistomerkillä.

12.15 **Lunĉo** en Saija ♦ enloĝiĝo por tiuj, kiuj mendis tranoktadon ĉi tie. **Lounas** Saijassa ♦ Saijassa majoittuville huoneiden vastaanotto

13.00 **Malfermo** ♦ bonvenigo nome de EAF, salutoj de la komunumo, eksterlandaj partoprenantoj k.a. ♦ muzika programero. *Avajaiset* ♦ *EAF:n tervetuloitovotus, kunnan ja ulkolaisten vieraiden tervehdyksiä ym.* ♦ *musiikkiohjelmaa.*

13.30 **Filmo Elokuv**a ”Reveno al Finnlando” (esperantonkielinen)

14.00 **Prelego** pri Kalle Päätalo kaj lia signifo por la regiono. *Esitelmä Kalle Päätalosta ja hänen merkityksestään seudulle.*

**Vizito al Kallioniemi** (Infanaĝa domo de Päätalo). *Käynti Kallioniemessä (Päätalon lapsuudenkoti).*

15.30-16.00 **Busveturo** al Metsäkylä laŭ la iama fervojo. *Bussikuljetus Metsäkylään entistä kenttärataa pitkin.*

16.00 **Kafo** en la Arbar-Baro. *Kahvi Arbar-(metsä-)baarissa.*

16.30-18.30 **Ekskurso** al la Arbaro de Zamenhof, al la arbohakista domo Vääräjärven kämppä, konatiĝo kun konko-kultivado. *Retki Zamenhofin metsään, Vääräjärven kämpälle ja tutustuminen raakkuviljelykseen.*

18.30 **Vespermanĝo Illallinen**

19.30 **Vespera kunestado** en la lernejo de Metsäkylä ♦ komuna kantado, eventualaj aliaj programeroj. *Illanvietto Metsäkylän koululla* ♦ *yhteislaulua, mahdollisesti muuta ohjelmaa.*

21.00 **Fino**, busveturo al la tranoktejoj. *Päätös, bussikuljetus majoituspaikkoihin.*

### **Dimanĉo 22.09.2002 Sunnuntai**

09.00 **Matena preĝo** (organizita de KELF). *Aamuhartaus (järj. KELF).*

10.00-10.30 **Vizito** al la oficejo de Päätalo-instituto. *Tutustuminen Päätalo-instituutin toimistoon.*

10.45-13.00 Tema programo: **Pensu globe – agu loke!** ♦ pri la tutmonda Esperantomovado kaj pri eblecoj loke agadi, konkretaj ekzemploj, kun paŭzo.

**Aliĝilo** Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 21.-22.9.2002

Nomo

Adreso

Tel./Fakso/Ret-adreso

Aliĝkotizo:

ĝis la 15.8. 16 •

ekde 15.8. kaj surloke 20 •

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Senpage infanoj sub 15 jaroj kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando.

La aliĝkotizo inkluzivas transportojn kaj vizitojn laŭ la programo.

Mi mendas la AT-paketon, inkluzivas tranokton laŭ elekto kaj manĝojn (2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

en amasloĝejo por FEJO-anoj 37 •

en kvarlita ĉambro 52 •

en trilita ĉambro 58 •

en dulita ĉambro 67 •

en unulita ĉambro 81 •

Mi mendas nur la manĝopaketon (2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) 27 •

Mi mendas bustransporton Oulu-Taivalkoski-Oulu 40 •

Mi pagos al la konto de EAF entute \_\_\_\_\_ eŭrojn.

Deziroj koncerne tranokton kaj manĝojn:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:  
Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarekatu 15 C 65  
FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bonvenon!

**Ilmoittautumislomake**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Syyspäiville 21.-22.9.2002

Nimi

Osoite

Puh./fax/sähköposti

Ilmoittautumismaksu:

- 15.8. saakka 16 •
- 15.8. jälkeen 20 •

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt.

Ilmoittautumismaksu sisältää ohjelmanmukaiset kuljetukset ja vierailut.

Tilaan syyspäiväpaketin, sisältää valitun majoituksen, ruokailut (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala):

- 37 • (yhteismajoitus FEJO-laisille)
- 52 • (majoitus 4 hh:ssa)
- 58 • (majoitus 3 hh:ssa)
- 67 • (majoitus 2 hh:ssa)
- 81 • (majoitus 1 hh:ssa)
- Tilaan pelkän ruokailupaketin (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) 27 •
- Tilaan bussikuljetuksen Oulu-Taivalkoski-Oulu 40 •

Maksan EAF:n tilille yhteensä \_\_\_\_\_ euroa.

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen

Lähetä ilmoittautumisesi osoitteella:  
Suomen Esperantoliitto ry  
Siltasaarenkatu 15 C 65  
00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825.

Tervetuloa!

*Teemaohjelma: Ajattele globaalisti – toimi paikallisesti! ♦ tietoja maailman ja Suomen esperantoliikkeestä ja paikallisista toimintamahdollisuuksista, konkreettisia esimerkkejä, välillä tauko.*

13.00 **Lunĉo** en la malnovstila vendejo-kafejo Jalava ♦ la posedanto Ari Jalava rakontos pri la historio de la domo. **Lounas** perinteisessä Jalavan kaupassa ja pirttikahvilassa ♦ omistaja Ari Jalava kertoo talon historiasta.

14.00 **Fino** Aŭtobuso al Oulu. **Päätös Linja-auto Ouluun.**

**Loĝado kaj manĝado**

La amasloĝejo estas en la vilaĝo Metsäkylä. Ĝi estas organizita speciale por FEJOanoj. La kvarpersonaj ĉambroj estas en la feriejo Saija. La ceteraj ĉambroj estas en hotelo Taivalvaara. Ni manĝos en malsamaj lokoj lige al la programo, en la feriejo Saija, en domo Halkola en Metsäkylä kaj en vendejo-kafejo Jalava.

**Asuminen ja ruokailu**

*Yhteismajoitus on Metsäkylässä ja tarkoitettu erityisesti FEJOn jäsenille. Neljän hengen huoneet ovat Saijassa, muut huoneet hotelli Taivalvaarassa. Ruokailu on eri paikoissa ohjelmas- ta riippuen; Saijan lomakeskuksessa, Halkolan talossa Metsäkylässä ja Jalavan kauppakar- tanossa.*

**Transporto**

Grupa trajnvojaĝo de suda Finnlando estas organizata: vendrede per nokta trajno, kiu atingos Oulu je 7.46 (starto de Turkuo 21.05, Helsinko 22.30, de Tampereo 1.18), dimanĉe de Oulu je 17.23 (alveno en Tampereo 21.59, Turkuo je 23.50, Helsinko je 23.56). Ankaŭ aliaj alternativoj kunvojaĝi kun aliaj partoprenantoj ekzistas. Por pliaj informoj kontaktu kun Tiina Oittinen! Bv. laŭeble baldaŭ indiki vian intereson pri la komuna vojaĝo! Tio helpas la planadon.

EAF ofertas la eblecon partopreni en komuna busa transporto Oulu-Taivalkoski sabatmatene

kaj Taivalkoski-Oulu dimanĉposttagmeze je la kosto de 40 eŭroj. La buso de Oulu startos 8.00 de la busa stacidomo (busa kompanio Ylisirniö). Bv. indiki vian interesigon pri tiu ĉi ebleco en la aliĝilo!

Pri aliaj eblecoj atingi Taivalkoski povas konsili nia loka kontaktpersono Aini Vääräniemi.

La moviĝanta AT-programo postulos ankaŭ transportojn en Taivalkoski, sed por ili vi ne devos krompagi. Tiuj kostoj estas inkluzivitaj en la partoprenkotizo.

### **Kuljetus**

*Etelä-Suomesta järjestetään yhteinen juna-matka: perjantaina yöjunalla, joka saapuu Ouluun 7.46 (lähtee Turusta 21.05, Helsingistä 22.30, Tampereelta 1.18), sunnuntaina takaisin Oulusta 17.23 (Tampereella 21.59, Turussa 23.50, Helsingissä 23.56). Muitakin vaihtoehtoja matkustaa yhdessä toisten osanottajien kanssa on. Ilmoita kiinnostuksestasi yhteiseen junamatkaan Tiina Oittiselle! Häneltä saat myös lisätietoja.*

*EAF tarjoaa mahdollisuuden osallistua yhteiseen bussikuljetukseen Oulusta Taivalkoskelle lauantaiamuna ja Taivalkoskelta takaisin Ouluun sunnuntaina iltapäivällä hintaan 40 euroa. Liikennöitsijä Ylisirniön linja-auto lähtee Oulun linja-autoasemalta klo 8.00. Ilmoittaudu tähän yhteiskuljetukseen ilmoittautumislomakkeella!*

*Muista tavoista matkustaa Taivalkoskelle antaa tietoja paikallinen yhteyshenkilömme Aini Vääräniemi.*

*Syyspäivien liikkuva ohjelma edellyttää kuljetuksia myös Taivalkoskella. Ne sisältyvät osanottomaksuun.*

### **Kontaktinformoj – Yhteystiedot**

Loka kontaktpersono – *Paikallinen yhteyshenkilö:*

Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala, (040) 518 7242, <aini.vaaraniemi@pp.inet.fi>

Respondeculo pri la trajnvojaĝo de suda Finnlando – *Junamatkan yhteyshenkilö:*

Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, (02) 230 5319, (050) 549 4709, <sekretario@esperanto.fi>

Se vi havas proponojn por la programo vi ankaŭ povas kontakti la prezidanton de EAF (kontaktinformoj p. 2).

*Ohjelmaa koskevista ehdotuksista voi ottaa yhteyttä EAF:n puheenjohtajaan (yhteystiedot sivulla 2).*

Kontaktinformoj por Hotelo Taivalvaara – *Hotelli Taivalvaaran yhteystiedot:*

Taivalvaarantie, tel. (08) 841 661.

Pliaj informoj (pri kvanto da aliĝintoj k.s.) aperos en la retlisto EAF-agadas (funkcias en Esperanto). (Se vi havas retroŝtan adreson vi povas aliĝi sendante malplenan mesaĝon al <EAF-agadas-subscribe@yahoo.com>. Vi ankaŭ povas peti aliĝon skribante al <anna.ritamaki@kolumbus.fi>).

*Lisätietoja (ilmoittautuneiden määrystä ym.) julkaistaan esperantonkielisessä uutisryhmässä EAF-agadas. (Jos sinulla on sähköpostiosoite, voit liittyä siihen lähettämällä tyhjän viestin osoitteeseen <EAF-agadas-subscribe@yahoo.com>. Voit lähettää liittymispyyntöön myös kirjoittamalla osoitteeseen <anna.ritamaki@kolumbus.fi>).*

La bazaj informoj pri AT aperas ankaŭ en la retejo <www.esperanto.fi>.

*Perustietoja syyspäivistä ilmestyy myös nettisivuilla <www.esperanto.fi>.*

Dum la unua aliĝperiodo (15.7.02) aliĝis 29 personoj (inter kiuj unu infano). Busan vojaĝon de Oulu mendis 13 personoj.

*Ensimmäisellä ilmoittautumiskaudella (15.07.02) ilmoittautui 29 henkilöä (joukossa yksi lapsi). Linja-autokuljetuksen Oulusta on tähän mennessä tilannut 13 henkilöä.*

## Tulevia – Venontaj

24.8.

### Pesäpalloa – nestopilko

FEJO tekee uuden aluevaltauksen urheilun saralla! Kunnareita tehdään klo 15 alkaen Helsingin Vuosaassa. Pelivälineet löytyvät paikan päältä. Jälkipelit käydään Hanna Helénin luona osoitteessa Kaivonkatsojantie 5 D 54.

Tarkat koordinaatit pelipaikalle saat lähempänä peliä FEJO:n postituslistalta tai Hannalta: <hehelen@helsinki.fi> tai 044 368 6148.

10.9–

### Lukupiiri – legorondo

Artikkeleita, kirjallisuutta ja henkevää keskustelua esperantoksi Hanna Helénin johdolla!

Legorondo istuu pöydän ääreen kerran kuussa tiistaisin klo 18.30. Kokoonnutaan EAF:n toimistossa Helsingissä osoitteessa Siltasaarenkatu 15 C 65.

Lisätietoja Hannalta, yhteystiedot edellä.

13.-15.9.

### FEJO-viikonloppu – FEJO-semajfino

Pro Esperanto -yhdistys kutsuu fejolaiset Ali-Seppälän elämystilalle Orimattilaan!

Tarjolla on maalaiselämää, luontoa, sieniä ja marjoja, islanninponeja, ekotaiteen tekemistä, kirpputori, Patrik Austinin suunnittelema roolipeli, nuotiolauluja... Siis sanalla sanoen elämyksiä!

Ota mukaan makuupussi, tyyny, omat juomat ja rahaa yhteisiä ruokakustannuksia varten. Matkajärjestelyt ovat vielä työn alla, seuraa FEJO:n postituslistaa.

Tutustu Ali-Seppälän tilaan: <www.saunalahti.fi/~bovo/index\_esperanto.html>

### 12.10. Megazone

Pum, räiskis, poks! Pura syksyn paineet kaupunkisodassa! Kaupunkisotaa leikitään klo 17 alkaen Helsingin Megazonessa osoitteessa Arkadiankatu 2. Varusteiksi sopivat urheilukuteet ja hyvät kengät. Hiki tulee, mutta suihkuun pääsee. Jälkipelit Helsingin illassa ja yössä.

Kaupunkisodan hienouksiin voi perehtyä osoitteessa: <www.megazone.fi>.

16.11.

### Perinteinen sählymatsi

#### – tradicia halhokea matço

Kuka voittaa tänä vuonna?!

Paikka ja kellonaika ovat vielä avoimia. Seuraa FEJO-sivuja ja postituslistaa!

Kaikista syksyn järjestelyistä ja aikatauluista pysyt parhaiten perillä seuraamalla FEJO:n postituslistaa. Liittymisohjeet löydät osoitteesta <http://groups.yahoo.com/group/fejo>.

Ilmoita osallistumisestasi syksyn rientoihin, kysy kiperiä kysymyksiä ja esitä toiveita: <katja.lampinen@edu.stadia.fi>, 040 523 6076.

---

## FEJO renkontigis futbale 29.6. en Lassila, Helsinki

Lyhyestä virsi kaunis: Team Hanna vastaan Team Katja 7-1. Aurinko paistoi ja sima maistui, ja ulkomaalaisvahvistukset Italiasta, USA:sta ja Espanjasta innoittivat FEJOnuoret tavallistakin aktiivisempaan esperanton ääntelyyn. Hikisen jalkapallo-ottelun perään pelailtiin perinteisiä leikkejä: polttopalloa ja peiliä. Hallituksen kokouskin pidettiin ennen katoamista Helsingin yöelämään. Kiitos sihteeri Katjalle pizzasta ja kongressitiloista :)

# Studenta semestro en Rejkjaviko

## AMUZIĜU, FRENEZIĜU KAJ SENIĜU JE LA MONO

Por vojaĝantoj Islando estas ekzotika diabla insulo kun mirindaĵoj kie ajn oni sin trovas: akvofaloj, vulkanoj, glaciejoj, gejseroj kaj diverskoloraj montoj nur ekzemple. Por interŝanĝaj studentoj Rejkjaviko ("Fumogolfo") estas vivplena ĉefurbo kun altkvalitaj diskotekoj kaj etosaj trinkejoj, sed ankaŭ loko kie oni lernas festi kun laŭeble malmulte da mono pro la teruraj prezoj. Se vi interesiĝas pri historio kaj tradicioj, ĉi tiu urbo de 170 000 loĝantoj apenaŭ estas por vi. Islandanoj interesiĝas pri eŭropa modo kaj amerika vivmaniero. Cetere hobiaj kaj laboro-oportunoj estas minimumaj. Aktivecoj kiujn Rejkjaviko ofertas ne estas multe pli pluraj ol subĉielaj naĝejoj kun naturvarma akvo kaj ŝak-ludado en trinkejoj, do la resto kuŝas sur la ŝultroj de la studentoj kiuj semajnfine trinkas en loĝejaj festoj ĝis la unua

kaj poste pasas la nokton en la urbocentro ĝis la sesa, kiam trinkejoj fermiĝas.

## Kial indas

Esperante estas nenio en Islando por junuloj. Tamen la etoso de Rejkjaviko similas al tiu de internaciaj eo-aranĝoj. Inter la studentoj, kiuj elektas tiun aĉaveteran monotruon antaŭ pli kutimaj interŝanĝaj alternativoj, ne estas teduloj. Oni renkontiĝas kun tre interesaj kaj amuzaj homoj kaj lernas rapide ke la kutimaj reguloj de konduto senutilas en Islando. Ho ve, en ĉi insulo oni povas libere esti si mem sen zorgi pri kion aliaj homoj diros. Islandanoj estas tre amuza kaj simpatia popolo. Malsimila al finnoj, kiuj tamen sentas allogon al Islando, ĉar finnoj estas klare la plej granda eksterlanda nacio en Universitato de Islando.

*Patrik Austin*

## Faktoj pri Islando

### ĈU VI NE SCIIS KE...

- ◆ Islando ne apartenas al EU kaj ne intencas aliĝi. Sed la lando ĝuas la avantaĝojn de eŭropa samlaboro pere de EFTA kun Norvegio, Svislando kaj Liĥtenŝtejno.
- ◆ Islando sin proklamis sendependa respubliko en 1944 post aŭtonomio interne de Danio. La nuna prezidanto nomiĝas Ólafur Ragnar Grímsson. Li estas viro kaj laŭdire aspektas kiel Raimo Ilaskivi.
- ◆ La lando ofertas praktike ĉiujn samajn servojn kaj amaskomunikilojn kiel la aliaj Nordiaj landoj. La bonstato – "islanda revo" – baziĝas sur fiŝindustrio kaj dura laboro.



- ◆ Islando estas konsidere granda insulo, iom pli granda ol Irlando. Ĝi evoluis el Nordatlanto nur antaŭ 16-25 milionoj da jaroj, kiam kontinentbretoj moviĝis kaŭze ke subfunda lafo elfluis kaj solidiĝis. La malglata terano similas al geologia situacio en la resto de la mondo antaŭ milionoj da jaroj.
- ◆ La loĝantara nombro estas nur ĉa. 280 000, iom malpli ol tiu de finlandsvedoj, sed la

relativa naskiĝkvanto estas pli granda ol en resto de Nordio.

♦ Pro la Golfa fluo, kiu alportas relative varman akvon el Karibio, la maro ĉirkaŭ Islando neniam frostiĝas. La vintra temperaturo estas kutime  $+5^{\circ}$ ...  $-10^{\circ}$ , la somera  $+10^{\circ}$ ...  $+20^{\circ}$ , la vento inter 5m/s ... 30m/s. Islandanoj neniam uzas ombrelojn – ne pro manko de pluvo, sed ĉar la vento povas disŝiri ombrelon en sekundoj.

♦ La unuaj loĝantoj estis irlandaj monaĥoj, kiuj en la frua mezepoko sekvis migrantajn birdojn serĉe de paco kaj sereneco en fora insulo. Iom poste dum la 800-aj venis Norvegoj serĉe de novaj oportunoj post rabi edzinojn el la Britaj insuloj. Reklamo por la islanda biero Víking argumentas, ke tiu edzin-rabo klarigas kial "Islando havas la belulinojn, sed en Britio restas la malbelaj hundinoj".

♦ Biero mem estis kontraŭleĝa substanco ĝis 1989, post kiam islandanoj ne drinkas nur fortajn alkoholaĵojn.

♦ Preskaŭ tuta historio de islandanoj estas dokumentita, komence de la sagaoj kiuj inkluzivas laŭverajn librojn krom la fikciaj rakontoj pri glavoj kaj magio.



♦ La islanda lingvo ne multe ŝanĝiĝis de tiu pranordia lingvo en kiu oni skribis la sagaojn. La vort-provizo similas al okcidentnorvegaj dialektoj, sed la gramatiko pli al la germana lingvo aldonante plurajn pliajn komplikajojn. Scipovo de la sveda certe helpas studi la islandan, sed ne aŭtomate kompreni ĝin.

---

## **Jäsenmaksulla mukaan FEJO:on!**

FEJO:n jäsenmaksu vuonna 2002:  
– alle 30-vuotiailta 10 •  
– tukijäseniltä 13 •

Maksa jäsenmaksu FEJO:n tilille  
101130-227446 (Merita).

Ilmoita yhteystietosi ja syntymäaikasi  
sihteerille: Katja Lampinen, 040 523 6076,  
<katja.lampinen@edu.stadia.fi>.

FEJO:n jäsenenä pysyt menossa mukana.  
Varsinaiset jäsenet saavat Esperantolehden.

FEJO-membrokotizoj 2002:  
– 10 •/ membro  
– 13 •/ subtenanta membro

Kontonumero supre.

---



## Kiel batali kontraŭ la burokratoj

Se vi volas konatiĝi kun burokratoj, iru eksterlanden. Hejmlande oni neniam trovas sufiĉe absurdajn situaciojn por vere senti la neceson al batalo.

Eksterlande ne estos malfacile trovi okazojn por dura batalo. Sendube vi baldaŭ trovos vin ekzemple en situacio, en kiu mankas al vi kaj la studentpruvilo kaj la restadpermeso – kaj vi ne povos havi la unuan sen la alia (aŭ la alian sen la unua). Estos por vi bonega okazo por provi la jen priskribitajn batalilojn.

La plej uzataj bataliloj estas atendado, krio, palpebrumado kaj ploro. Kiun el ili vi uzos, dependas de vi kaj de via kontraŭulo. Estas bone atenti pri la fortekvilibro antaŭ ol komenci la batalon. Ne iru en vanan militon, certu, ke vi havas venkoeblon! Se estos viro kontraŭ viro, vi verŝajne elektos la unuan batalilon, se virino kontraŭ virino, la laste menciitan metodon. Mi mem kutime uzas la du lastajn. Por mi ili estis ĉiam la plej efikaj. Mi rakontu ekzemplojn.

Viro kontraŭ viro aŭ virino kontraŭ virino estas ĉiam malfacila kombino por batalo. Do prefere atendu. Se vi estas viro kaj bezonas ekz. plilongigi la validon de via laborpermeso, estas certe plej saĝe atendi ĝis ina oficisto alvenas al ĝiĉeto. Viaj ŝanĉoj multobliĝas tuj, kaj eĉ se vi devas unue iom atendi, vi fine gajnos tempon. Ofte vi bezonos nur rideti kaj bele rigardi la oficinon – eble unu aŭ du vortoj kiuj igos ŝin senti sin bela – kaj ne plu devus esti problemoj. Vi evitos la tutan batalon per saĝa uzo de atendata metodo.

Foje, tamen, ne estas en la oficejo aliseksaj oficistoj, kaj vi devas riski batalon kontraŭ samseksa malamiko. Kutime, batalo estas tiam neevitebla. Komencu per observi la grandon de la burokrato. Se vi estas multe pli malgranda ol la burokrato, vi povas provi trompi lin aŭ ŝin per krio. Por tio vi tamen bezonas riĉan kaj fluan

vortaron (estas bona ideo ekzerci sin hejme). AVERTO: Neniam eniri en kribatalon se via vortaro ne estas sufiĉe granda! Estos malfacile ŝanĝi la ilon mezvoje de kribatalo! Dum kribatalo, ne aŭskultu la kontraŭulon, koncentriĝu en viaj proprajn vortojn. Ĵetumu viajn brakojn, siblu kaj uzu frazojn kiel: ”Nenie alie en la tuta mondo...”, ”Estas tamen nekredible...” kaj ”Tute malprave! Laŭ internaciaj leĝoj mi rajtas havi ĉi tiun daŭrigon senpage, do silentu kaj subskribu!”. Post mallonga tempo kaj multa bruado, la burokrato laciĝos kaj por silentigi vin donos al vi tion kion vi volas.

La plej uzata ilo kontraŭ aliseksaj kontraŭuloj estas la okuloj – aŭ la okulharoj, se vi ŝminkas viajn okulharojn. Palpebrumu, palpebrumu, palpebrumu, senhonte! Mi unufoje sukcesis liberigi min de impostoj je 2500 FF en Francujo per ĉi tiu metodo, do ne subtaksu ĝian potencon! Jes, certe, por finnoj estas iom stranga sento sidi, rideti kaj klopodadi per siaj okuloj, sed kreu min, estas multe uzata internacia metodo, kaj oni ne devas honti uzi ĝin en batalo kontraŭ burokratoj. (Vi havos jen ankaŭ ŝancon al aldonata punkto: la tuto eble finiĝos je rendevuo kun via kontraŭulo, kaj tio ja estus bonega afero por via lingvolernado. Eble la venontan fojon vi havos sufiĉan vortaron por uzi ankaŭ la kribilon.)

Kaj laste, mia kutima metodo, la ploro. Kelkfoje la ploro helpas vin tuj, aliffoje nur semajnojn poste, sed min ĝi ĉiam helpis. Mi konfesas, ke mi neniam INTENCIS uzi la plorilon, sed iel mi ĉiam... Do. La ploro jam taŭgis kontraŭ kaj viroj kaj virinoj – eble ĉar mi estas 1,8 metra, granda blonda virino kaj tiaj virinoj ja ne devus plori. Iel konfuzas la kontraŭulon mia ploro.

Mia ekzempla okazo okazis dum la pasinta semajno en Kolonja urba oficejo, kie mi provis ekhavi mian germanan restadpermeson. Dum ▷

## Sur la nokta ĉielo

En Esperantolehti komencas nova serio, kie ni konatiĝas kun astronomiaj objektoj vidataj sur la nokta ĉielo. La traktataj objektoj estos plejparte videblaj per nuraj okuloj, oni neniel bezonas teleskopon por ĉi tiuj. Binoklo tamen estas tre uzebla ilo por pli bone vidi kelkajn objektojn. Kiu ajn binoklo taŭgas, kompreneble tamen pli granda estas pli bona.

La mezuro de binoklo estas kutime indikita per du ciferoj. La unua estas la grandigo, kiom oble la binoklo grandigas la vidatan objekton. La dua cifero estas la diametro de la objektivilenso en milimetroj. Kutimaj ciferoparoj estas ekzemple 8x22, 8x35, 7x50 kaj 12x50. Por astronomia uzo la pli grava estas la dua cifero. Ju pli granda objektivilenso, des pli da lumon la binoklo kolektas, kaj tio helpas vidi malbrilajn objektojn. Granda grandigo estas iam bona, sed aliflanke ĝi en iuj okazoj povas malfaciligi trovadon de celata objekto.

Ĉefe oni bezonas pli-malpli malluman observolokon. En urboj povas esti probleme trovi tian,

sed kutime iu roka monteto sen konstruaĵoj kaj altaj arboj taŭgas.

Nun estas tre bona tempo komenci observadon de la ĉielo, ĉar en aŭgusto kaj septembro estas la sola tempo, kiam en Finnlando estas mallumaj, sed samtempe ankoraŭ agrable varmaj noktoj.

### Pri astronomiaj nomoj kaj terminoj

Kvankam eblas transformigi nomojn de steloj kaj konstelacioj al Esperantaj formoj (o-finaj ktp.), kaj ankaŭ la Plena Ilustrita Vortaro konas kelkajn tiajn, mi decidis ne uzi tiajn, ĉar por ili jam ekzistas internacie konataj kaj komunaj nomformoj. La steloj kutime havas nur unu formon de la nomo, kiun oni uzas en ĉiuj lingvoj. La Polusstelo (*Pohjantähti*) kaj la Suno estas praktike la solaj steloj, kies nomoj malsamas en diversaj lingvoj.

Por konstelacioj (*tähtikuvio*) ekzistas diversaj nomoj en diversaj lingvoj, sed iliaj latinaj nomformoj estas en astronomia mondo internacie

mia vizito, mi estis malsana kaj lacega, do ankaŭ plorema. Mi vidis, ke en la oficejo en la dua etaĝo de la urbodomo mia burokrata kontraŭulo estos viro. Mi tuj pensis pri la palpebroj (krii ja ne estus helpa, ĉar mi tiel lacis ke mi nur malfacile trovis vortojn en la germana, kaj mi eĉ en mia mallaca stato tre malbone krias). Post duonhora atendo, mi finfine rajtis eniri la ĉambron de la malgranda burokrato. Mi palpebrumis kiel frenezulino. Tute ne helpis! ”Kion vi serĉas ĉitie? Vi devas unue anonci vin ĉe la giĉeto en la teretaĝo”, diris la viro strikte al mi. Mi tute ne intencis ekplori, sed mi estis tiom laca kaj frustrita, ke mi faris (fine, tio estis belega ko-

menco por batalo: neniam montru, se vi intencas plori, ĉio devas aspekti hazarda!) ”Pardonu... mi tute ne komprenas... ho, mi estas tiel laca, mi kredas ke mi malsanas... pardonu, pardonu...” La konfuza viro donis al mi amason da paperoj, (kiujn mi eble senplore estus ekhavita nur dum miaj 3.-10. vizitoj al lia oficejo), kaj sendis min al la teretaĝo. Mi trankviliĝis kaj tien iris. Ĉe la giĉeto staris nur virinoj. Mi elektis mian kontraŭulinon, kaj montris al ŝi miajn paperojn. Bedaŭrinde en unu el la paperoj estis misskribaĵo... Mi ree ekploris. La virino tute ne sciis kion fari pri la grandegulino kiu larmadis malantaŭ ŝia giĉeto, do ŝi donis al mi monaton pli da tempo


konataj kaj uzataj. Do mi malfavoras kreadon de tria nivelo de nomoj krom la nacilingvaj kaj la jam internaciaj latinaj. Mi uzos ĉefe latinajn, sed ankaŭ aldonas la finnajn tradukojn, almenaŭ kiam unue menciataj.

La Luno kaj la planedoj ne havas tute internacie komunajn formojn de siaj nomoj, do ankaŭ Esperanto havas proprajn formojn de ili.

Por atingi klarecon mi laŭ bezono aldonas finnan tradukon al kelkaj astronomiaj vortoj.

### Konstelacioj Auriga, Perseus kaj Cassiopeia

Ni komencas kun tri konstelacioj, kiuj en fruaŭtunaj vesperoj estas en la nordorienta ĉielo. Malalte ĉe la horizonto estas Auriga (finne Ajomies). Ĝia plej brila stelo Capella estas la sese plej brila stelo de la tuta ĉielo. Se ĝi en meza somero estas nur apenaŭ videbla, en la mallumiĝantaj vesperoj de aŭgusto ĝi estas tuj okulfrappe brila kaj facile trovebla. Malsupren de Capella oni trovas la kvinangulan formon de la konstelacio Auriga. Tuj en la komenco de la mallumo la plej malsupra de la kvin steloj povas esti nevidebla en



la horizonto, sed la tagnokta ĉirkaŭiro de la ĉielo pli poste movas ĝin supren.

La najbara konstelacio Perseus (finne ankaŭ Perseus) estas bone konebla pro arko de kvin steloj. La meza kaj plej brila estas Mirfak. En ambaŭ flankoj de Mirfak estas kvazaŭ simetrie du malpli brilaj, kaj kelkaj ankoraŭ malpli brilaj.

Rekte supren de Perseus estas Cassiopeia

por kompletigi miajn dokumentojn, kaj sendis min hejmen kun miaj paperoj kaj larmoj. Post unu semajno mi sentis min sufiĉe forta por reprovi mian ŝancon kun la burokratoj. La virino tuj rekonis min. Estis vico ĉe la ĝiĉeto, sed ŝi lasis min veni unue. Miaj paperoj estis daŭre misaj, sed certe por timo ke mi denove ekploru, ĉi-foje tio ne gravis. Mi ekhavis la bezonatajn dokumentojn post kvin minutoj kaj grimpis al la dua etaĝo, al la viro. Ankaŭ la viro tuj rekonis min. Li ekstaris, sed kiam mi ridante (kaj palpebrumante) promesis ke hodiaŭ mi ne ekploros, li ridetis kaj ree sidiĝis. Post dek minutoj mia restadpermeso estis preta.

Do, mia konsilo al komencantaj kontraŭburokrataj batalantoj estas, ke vi komencu per atendi ĝis taŭgeseksa kaj -granda burokrato aperos, kaj poste rapide trovu metodon, kiu surprizos vian kontraŭulon tiel, ke li forgesos sian propran metodon. Estas sporto, en kiu ekzercu faras majstron, do ne senesperu, se via unua provo ne sukcesos. Mia ekzemplo ja montras, ke viaj iloj povas havi longdaŭrajn efikojn!

Bonajn momentojn eksterlande,

*via spertulino*  
Liisa

(finne Kassiopeia), konstelacio de kvin preskaŭ egalbrilaj steloj en formo de larĝa letero W. Ĝi estas facile konebla, ĉar neniu alia konstelacio havas kvin tiom brilajn kaj samtempe tiel egalbrilajn stelojn en tiom kompakta kaj simetria formo.

Tiuj tri konstelacioj estas preskaŭ precize sur la Lakta Vojo (*Linnunrata*), larĝa strio de steloj, kiu en aŭtunaj vesperoj direktiĝas ekde nordokcidento trans la tuta ĉielo al sudo aŭ sudokcidento. Por vidi ĝin oni bezonas iomete malluman observolokon, en urboj ĝi kaŝiĝas kaŭze de stratlumigiloj.

En direkto de Perseus kaj Auriga estas la plej malbrila parto de la Lakta Vojo. Pli brilajn partojn de ĝi oni vidas rekte supre kaj proksime de la suda horizonto. La plej brilaj partoj de la Lakta Vojo tamen situas ankoraŭ pli sude kaj estas ne videblaj en Finnlando. Fakte la plej bona tempo vidi brilajn partojn de la Lakta Vojo en Finnlando estas ĝuste nun, frue aŭtune kaj vespere tuj ĉe komenco de mallumo. Pli malfrue ili turniĝas nevideblaj sub la sudan horizonton.

### Planedo Saturno

Ĉi-aŭtune Saturno estos la plej bone videbla planedo. Ĉiuj planedoj moviĝas iom post iom kompare kun la steloj, sed la tutan aŭtunon Saturno estos rekte malsupre de la kvinangula formaĵo de Auriga. Ĝi estas nur malmulte malpli brila ol Capella. En aŭgusto ĝi estos nur post meznokto super la horizonto, sed pli poste aŭtune ĝi leviĝos pli kaj pli frue.



La ringoj de Saturno videblas per granda binoklo.


### La perseidaj meteoroj

En la noktoj 10. - 13. de aŭgusto estas (ĉiujare) bonaj eblecoj vidi meteorojn, aŭ stelfalojn (*meteorologi tähdenlento*). Tiam okazas unu de la plej aktivaj meteorgrupoj (*meteoriparvi*), la perseidoj (*perseidit*).

Meteoro videblas, kiam ŝtono fluganta en la spaco hazardas veni al atmosfero de la Tero. La ŝtono bruliĝas kaŭze de frikcio, kaj tio naskas la lumefikon. Meteorgrupoj okazas, kiam la Tero trairas orbiton de iu kometo, el kiu disiĝis pecoj. Ĉar la Tero en sama dato ĉiujare iras al sama loko en la spaco, do grupoj de meteoroj okazas en la samaj datoj ĉiujare.

Ĉar ĉiu ŝtono, kiu apartenas al iu meteorgrupo, venas de sama direkto, ĉiu meteoro de la grupo ŝajnas aperi el sama loko de la ĉielo. Ili kvazaŭ radias el unu punkto de la ĉielo. Nomojn oni donis al meteorgrupoj laŭ la konstelacioj, kie tiuj lokoj situas. La perseidoj havas la nomon laŭ konstelacio Perseus. La punkto, el kiu la perseidoj aperas, estas en la norda parto de Perseus. Tiu estas aŭtune vespere ĝia maldekstra supra parto.

Tamen oni ne atendu grupon de meteoroj signifi, ke oni vidus multajn meteorojn samtempe. Dum perseidoj oni povas eble vidi averaĝe unu meteoron en minuto, se oni havas bonŝancon.



# Trakalendare

Multegaj tagoj en la kalendaro estas dediĉitaj al bonaj aferoj, sed nur la tradiciajn finnajn festotagojn kaj temotagojn ni memoras. Estas interese trafoliumi kalendarojn kaj serĉi tagojn malpli konatajn. Bonaj fontolibroj estas *Päivien kirja* de Sami Feiring kaj Heikki Oja (Otava 2000), *Teemakalenteri* de S. Feiring kaj *La Jaro de Flandra Esperanto-Ligo*. Al Teemakalenteri eblus senpage aldonigi pliajn temojn. Mankas en ĝi niaj Esperantaj temoj, Zamenhof-tago (15. 12.), Semajno de Internacia Amikeco (lasta plena februara semajno), mortotago de Zamenhof (14.4.), nomata ekde ĉi jaro Tago de pioniroj, pro la iniciato de la Civito. Kaj kiam estas nia Ago-Tago?

Kelkaj internaciaj kaj finlandaj temotagoj kaj -semajnoj ne estas rigide fiksitaj je konstanta

## Aŭgusto

**La 20an** en Hungario oni festas novan panon kaj konstitucion.

## Septembro

**3.9.** En Usono: Laborista tago, sed ĉe ni 1.5. kaj en Kanado 6.9.

**8.9.** Internacia tago de legoscio, iniciate de la UN. Tiam ni povus pritrakti diversajn alfabetojn kaj skribmanierojn, ankaŭ niajn diakritajn literojn (ĉ, ŝ, ä, ö, å, k.a.).

**15.9.** En Japanio: Tago de maljunuloj. La UN tamen iniciatis, ke la unua de oktobro estu la Internacia tago de aĝuloj. Ni neniel diskriminaciu ilin!

**23.9.** Japanoj memoras (kultas) siajn mortintojn, sed katolikoj tion faras la 2an de novembro; ĉijare ankaŭ protestantaj finnoj.

**28.9.** En Tajvano estas la Tago de la instruisto, (sed Monda tago de la instruistoj 5.10!)

## Oktobro

**1.10.** Internaciaj tagoj de muziko, vegetarismo kaj aĝuloj. Kiu el ili al vi gravas?

Tiaj estas ekzemple finna Tago de vilaĝvendejoj, Eŭropa koloniĝardena tago kaj Rozo-semajno en julio. (La tuta jaro 2002 estas dediĉita al rozoj!) Aŭtune ni havas Militinvalidan kaj Senvandalisman semajnojn, Tagojn de l'poŝtmarko, bonmoroj kaj navigado, ni havas Hejmosemajnon, Senruban semajnon, Internacian florbulban tagon (kutime la 8an de septembro) kaj aliajn. Ĉu vi iam aŭdis pri Semajno sen kapdoloro aŭ pri Ŝparemosemajno (Nuukuusviikko) aŭ Tago de l'ovo? Novaj temoj aperas kaj malnovaj malaperas. Kiu ajn rajtas iniciati temotagon aŭ semajnon, sed espereble ĝi ne restu nur nomo en la kalendaro.

Dum venontaj monatoj okazos, inter aliaj, la sekvaj temo- aŭ festotagoj. (Kristanajn kaj plurajn ŝtatajn mi forlasas.)

**3.10.** Fondotago de Koreio, fondita antaŭ 4335 jaroj.

**4.10.** Tago de bestoj, mortodatreveno de Francisko el Asizo.

**5.10.** Antaŭe ĉi dato estis por Internacia infana tago, sed ekde 2002 oni dediĉas la 20an de novembro al la infano kaj ties rajtoj kaj la kvinan de okt. oni dediĉas al instruistoj.

**9.10.** Tago de Universala Poŝta Unio, Tago de la letero. Ĉu ni memoru niajn plumamikojn?

**10.10.** Tago de sano kaj sporto en Japanio.

**15.10.** Internacia tago de la blanka bastono (blinduloj).

**16.10.** Internacia nutraĝa tago, iniciate de la UN.

**17.10.** Internacia tago por forigi malriĉecon, iniciato de la UN.

**18.10.** En Finnlando Tago de l'fabelo, nomtaga festeto de knabinoj kaj virinoj nomitaj Satu (=fabelo).

**22.10.** Internacia balbutadotago. Balbutado ne dependas de (manko de) intelekto!

**24.10.** Tago de la Unuiĝintaj Nacioj en la Malarmada semajno.

*Kompilis Saliko*

## Muso kuras, muŝo flugas, eli mitä ”hattu” saa aikaan

On vaikea muistaa ”hatun naula” esperanto-sanoissa, varsinkin jos ei ole kuullut sanaa oikein äännettynä tai ei ole tietoinen merkityseroista, joita hattu aiheuttaa. Itseäni auttoi hatun käytön yhdistäminen merkityseroihin, koska en paljon kuule esperantoa. Sitäpaitsi suhuaanteet s, ŝ, c, ĉ, ĵ, ĝ ovat suomalaisille tunnetusti vaikeita erottaa. (Minua lohdutti kovasti, kun sain tietää, että puhelimesta ne ovat kaikenmaalaisille vaikeita.) Siispä hatuilla ja suhuaanteilla on hyvä pallotella ja luoda itselleen hassujakin mielikuvia: – *Kruco estas kristana simbolo sed sur la manĝotablo staras kruĉo* (kannu). – *Se vi havas tuson, vi estas malsana, sed ĉu tuŝo* (kosketus) *resanigos vin?* – *Simo estas finna vira nomo; ŝimo kovras la manĝaĵon, kiun mi forgesis en la fridujo.* – *En stalo staras ĉevaloj; ŝtalo estas metalo.*

Erimerkityksissä sanapareissa auttoi minua J. Murjanin pieni vihkonen *Kial la ĉapelo?*, vaikka se onkin vain esperanton ja heprean kielinen lista. Tässä lisää pareja. Tunnetko ne?

*postaĵo – poŝtaĵo, pago – paĝo, stato – ŝtato, versi – verŝi, ago – aĝo, gemo (jalokivi) – ĝemo* (valitus, voihe)

Jos pareja on vaikea muistaa ilman lauseita, niin sommittele lause itse: – *Ŝalmoj bele muzikis dum ni manĝis salmojn.* – *La sorto de knabino en mallonga ŝorto: ŝi ne eniru preĝejon.* – *Sufokiĝis la viro, kiu glutis sian bongustan tranĉon en tranco.*

Toiset ihmiset puolestaan leikittelevät näkökuvilla:

*ŝirmilo* – suoja sateelta ja auringolta  
*ŝminko* – peittää pienet kauneusvirheet  
*ŝarko* – hailla on evä  
*ŝlosi* – lukita, haka on päällä  
*ŝarĝo* – kuorman pitää olla tasapainossa

*ŝerculo, ŝerci* – leikinlaskijalla on pellen hattu

*serĉulo, serĉi* – etsijä löytää hattunsa vasta myöhemmin (myös englannin ”search” auttaa tässä).

Jos kaveri ääntää/kirjoittaa jatkuvasti väärin, niin parasta on huomauttaa, kun *cento* sotkeutuu tunteisiin (*sentoj*) tai suomen/ruotsin kieli tekee *societosta* jotain soosia (sosiaalinen, societetsms). Vaikeimpia sanoja äännettäväksi lienee suomalaiselle *scii*, josta pitää saada s-ts-i-i! Ehkä auttaa, jos mielessäsi sidot sen aivastuksiin, vaikka se ei olekaan astsii!

Hatut naulaan tai sieltä pois!

*Saliko*

*Leikissä mukana A-L. Ali-Simola*

## Ulistaanko turhaan?

Nähtyäni painetussa esperantotekstissä käytetävän sopraanosta sanaa *sopranulino* ja tenorista *tenorulo*, jäin miettimään, että pitääkö välttämättä sanoa ”nais-sopraano” tai ”mies-tenori”, sillä ei ole olemassa mies-sopraanoa eikä nais-tenoria. Joel Vilkin ja Helja Favénin Suomi-Esperanto-Suomi-sanakirjassa (1982) *soprano* on suomeksi sopraano. Suomalaiseen korvaani *sopranulino* ei soi kauniisti, varsinkaan, jos se lausutaan suomalaisella aksentilla *sopra-mulino*, ja vielä pahemmalla se kuulostaa lausuttuna *sopran-ulino*.

Eikö näitä päätteitä voi yksinkertaisesti jättää pois? Bona Lingvo -kirjan tekijä Claude Piron sanoo, että milloin on mahdollista tehdä valinta kahden sanan välillä, hän valitsee aina mieluummin lyhyemmän muodon. Olen hänen kanssaan samaa mieltä. Lyhyempinä e.m. sanat ovat sekä käytännöllisempiä että kauniimpia.

*A-L.A-S., entinen I-sopraano ilman ulinaa*

# Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@esperanto.fi](mailto:ilkka.santtila@esperanto.fi) mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ Sakari Kauppinen, [sakari@skau.pp.fi](mailto:sakari@skau.pp.fi)
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ [martti.pennanen@pp.phnet.fi](mailto:martti.pennanen@pp.phnet.fi)
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ [matti.wallius@pp.inet.fi](mailto:matti.wallius@pp.inet.fi)
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☒ [andromeda@koti.tpo.fi](mailto:andromeda@koti.tpo.fi))
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☒ [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi). Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☒ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2002**  
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

### Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
1/2 sivua 400 mk	1/2 sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



### Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus \_ / \_\_ alkaen.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy \_ / \_\_.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu \_ / \_\_ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Kestotilaus \_ / \_\_ alkaen.

Tilaus \_ / \_\_ alkaen.

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

**Posti-  
merkki**

**Suomen  
esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65  
00530 Helsinki**

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuun alussa. Jutut 15.9.2002 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2002 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.